

**Renato Corsetti**

(emeritiĝinta el)

Universitato de Romo “La Sapienza”

## Esperantistoj fronte al afrikaj lingvoj

**Resumo:** Esperanto disvastiĝas tre rapide nun en Afriko kaj la entuziasmo pri ĝi eĉ superas tiun en aliaj kontinentoj. Intertempe la lingva situacio en Afriko komencas ŝanĝiĝi favore al uzado de lokaj lingvoj ankaŭ en Okcidenta Afriko. Estas kelkaj ĉefaj kaŭzoj pri tio, kiuj resumeblas per ŝanĝo de la politiko de la Monda Banko, kiu dum jardekoj donis pruntojn al evoluantaj landoj nur kun la kondiĉo, ke ili instruu grandajn internaciajn lingvojn. El tio sekvas, ke oni pli kaj pli ekuzas afrikajn lingvojn en edukado. Sekve nia movado bezonas la samajn komparajn studojn, kiujn oni jam faris en la pasintaj jardekoj pri la suahila, se oni volas vere produkti lerno-materialon efikan pri Esperanto en afrikaj lingvoj.

**Ŝlosilvortoj:** Esperanto, haŭsa, suahila, niĝeraj-kongaj lingvoj

### 1 Enkonduko

La libro de Heidi Goes (2007) bonege dokumentas la unuajn kontaktojn inter Afriko kaj esperantistoj.<sup>1</sup> Temis, kiel oni povas supozi, pri esperantistaj funkciuloj de la koloniaj potencoj en Afriko, kaj en la administra kaj en la armea sektoroj. Malgraŭ la malfacilaj kondiĉoj ili atingis konsiderindajn rezultojn ĉefe en Norda Afriko, de Alĝerio al Egiptujo, sed plejparte inter kuneŭropanoj. En esperantistaj fontoj estas menciata la kapitano Auguste Capé-Montrosier, kiu en 1903 komencis fari “neordinare viglan propagandon per artikoloj kaj paroladoj” ... kaj kun Harold Tarry li fondis samjare la unuan Esperanto-grupon (Goes 2007: 16). Ankaŭ en Egiptujo tre frue, en 1901 artikoloj verkita de René Japiot en Aleksandrio aperis en *La Correspondence Egyptienne illustrée*, al kio sekvis aliaj agadoj ĝis la komenco de la unua mond-milito, kiam esperantistoj foriris al Eŭropo kaj la agado en Egiptujo preskaŭ estingiĝis (Goes 2007: 19).

---

1 Redakcia noto: Ni funebras la aŭtoron de ĉi tiu artikolo. Renato Corsetti forpasis en februaro 2025. Nekrologo aperas en ĉi tiu kajero de la revuo. La artikolo baziĝas sur prelego de Renato Corsetti eldirita en la Esperantologia Konferenco kadre de la Universala Kongreso de Esperanto en Aruŝo (Tanzanio) en aŭgusto 2024. La manuskripton la aŭtoro submetis al nia revuo en aŭtuno 2024. La formalajojn de la revua stilo kaj de la bibliografio ni tamen devis finfari sen povi peti la aprobon de Renato Corsetti. Krom la redaktoroj la tekston redaktis la edzino de la aŭtoro, Anna Löwenstein. Ni ankaŭ dankas pro helpo de Michele Gazzola.

Simile en Sud-Afriko estis esperantistoj jam antaŭ la fino de la 19-a jarcento. Sed en tiu epoko tute neniel estis interesiĝo pri afrikaj lingvoj fare de la tiamaj esperantistoj, krom iom da materialo aperinta en Egiptujo en la araba, kaj la situacio restis tia ĝis la 1960-aj jaroj, kiam la ondo de sendependiĝo en Afriko post la dua mond-milito estis en plena progreso.

Post la Karavano de Amikeco de Tibor Sekelj, kiu tuŝis plurajn afrikajn landojn kaj faris kontaktojn kun politikistoj kaj intelektuloj, en 1962 aperis teksto de Sekelj mem. La broŝuro *Esperanto: Komuna Lingvo por Afriko – Komuna Lingvo por la Mondo!* aperis en la angla, la franca kaj la araba (Sekelj 1962a,b,c). Sed ĝi ne aperis en iu ajn afrika lingvo. Verdire jam en 1953 Unesko estis eldoninta siajn konsilojn al aziaj kaj afrikaj liberiĝintaj landoj pri ekuzado de la propraj lingvoj ĉefe en edukado, sekve de multaj studoj pri apartaj landoj kaj pri kunveno de fakuloj en 1951 (Unesco 1953), sed tiuj konsiloj restis neatentitaj dum duona jarcento.

En la menciita teksto oni simple alvokis afrikanojn esti ekzemplo por la mondo pri justa solvo de la komunikaj problemoj inter malsamlingvaj grupoj en Afriko.

Ĉiokaze de tiu periodo komenciĝis pli aktiva interesiĝo ĉe esperantistaj organizaĵoj pri Esperanto en Afriko. Oni komencis okupiĝi pri la kontaktoj faritaj de Sekelj dum la vojaĝo de la Karavano de Amikeco kaj fine en la 1970-aj jaroj broŝuro de UEA kaj TEJO aperis en 1979 ankaŭ en la suahila:<sup>2</sup> *Kwa kulinda tamaduni za Afrika 'Por defendi afrikajn kulturojn'* (UEA / TEJO 1979).

## 2 Nuna situacio

El la dua duono de la 1970-aj jaroj laŭgrade oni ekinformis afrikanojn pri Esperanto per anoncoj en loke legataj gazetoj. Hans Bakker, multe helpata de Germain Pirlot, okupiĝis pri la franclingvaj landoj de Afriko kaj Nino Vessella en la komenco de la 1980-aj jaroj pri la suahillingvaj landoj, kie aperis anoncoj en Kenjo kaj Tanzanio ekde 1981.<sup>3</sup> Kaj en 1982 aperis la lernolibro en la suahila de Nino Vessella: *Jifunze lugha ya Kiesperanto 'Lernu la lingvon Esperanto'* (Vessella 1982), kiu de tiam estis utiligata en la landoj de Orienta Afriko, dum Hans Bakker uzis ĉefe franclingvajn lernolibrojn kaj foje anglalingvajn.

Ĉi tiu agado estis ĉiam pli sukcesa, komencis okazi afrikaj kongresoj kaj la movado tiom kreskis, ke oni alvenis en 2024 al la unua afrika Universala Kongreso en Aruŝo, Tanzanio. Sed la rilato de esperantistoj kaj de la afrikaj

2 Redakcia noto: La nomon de la lingvo, kiu en PIV estas svahila, la aŭtoro sisteme literumas suahila.

3 *Jeune Afrique* estis la franclingva revuo pleje uzita de Hans Bakker, *Taifa Leo*, *Taifa Weekly* kaj *Uhuru* tiuj uzitaj de Nino Vessella.

registroj al afrikaj lingvoj restis apenaŭa. En la plejmulto de afrikaj landoj la ekskoloniaj eŭropaj lingvoj estis la sola lingvo uzata en lernejoj, kaj Esperanto estis instruata pere de tiuj lingvoj. Interalie la internaciaj premoj favoraj al tiuj lingvoj restis konstantaj dum jardekoj ĝis lastatempe. Fakte nur en 2021 la Monda Banko abrupte ŝanĝis sian politikon pri preferataj lingvoj en instruado kaj transiris de favorado de instruado per la grandaj internaciaj lingvoj al favorado de instruado en lokaj lingvoj per la politika deklaro aperinta en la 14-a de julio 2021: *Loud and Clear: Effective Language of Instruction Policies for Learning* ‘Laŭte kaj klare: politikoj pri efikaj lingvoj de instruado’ (World Bank 2021):

Poor Language of Instruction policies harm learning, access, equity, cost-effectiveness, and inclusion. Yet nearly 37% of students in low- and middle-income countries are taught in a language they do not understand. Massive learning improvements are feasible by teaching in a small number of additional languages. The World Bank’s first Policy Approach Paper on Language of Instruction offers an indication of the work that will be undertaken to support countries in introducing reforms that will result in more resilient, equitable, and effective systems by promoting teaching in the languages that students and teachers speak and understand best.

(Netaŭgaj politikoj pri instrulingvoj malhelpas lernadon, alireblon, justecon, kost-efikecon kaj inkluzivigon. Tamen preskaŭ 37 elcentoj de studentoj en landoj kun malaltaj aŭ mezaj enspezoj estas instruataj en lingvo, kiun ili ne komprenas. Enormaj lerno-pliboniĝoj estas atingeblaj per instruado en malgranda nombro da aldonaj lingvoj. Per sia unua ‘Dokumento pri la aliro al politikoj pri instruaj lingvoj’ la Monda Banko prezentas indikojn pri la laboro farota por subteni landojn, kiuj enkondukos reformojn, kie rezultos sistemoj pli elastaj, justaj kaj efikaj per antaŭenigo de instruado en la lingvoj, kiujn studentoj kaj instruistoj parolas kaj komprenas plej bone.) (nia traduko)

Preskaŭ samtempe la Organizaĵo de franclingvaj landoj, Organisation internationale de la Francophonie (OIF), ekfunkciigis similan programon, ELAN, kiu celas certigi

[...] l'accès de tous les élèves à un enseignement de base dans une langue qu'ils maîtrisent pour ensuite faciliter l'acquisition d'une ou plusieurs autres langues et faciliter également la maîtrise des autres disciplines scolaires et ainsi améliorer les performances scolaires y compris en français. Une telle offre permet ainsi non seulement d'améliorer la qualité des premiers apprentissages mais également de répondre au défi de l'éducation du 21ème siècle [...]. (IFEFE 2024)

([...] la eniron de ĉiuj lernantoj al unua instruado en lingvo, kiun ili mastras, por poste faciligi la akiron de unu aŭ pluraj aliaj lingvoj kaj faciligi samtempe la mastrumadon de aliaj lernejoj kaj tiel plibonigi la lernejarajn rezultojn, inkluzive en la franca. Tia oferto permesas ne nur plibonigi la kvaliton de la unua lernado sed samtempe respondi al la defioj de edukado de la 21-a jarcento [...].)

La retejo de OIF informas, ke nuntempe la programo ELAN donas subtenon teĥnikan kaj financon al 13 landoj partneraj: Burkinafaso, Burundo, Ebura Bordo, Kameruno, Gvineo, Malagasujo, Malio, Maŭritanio, Niĝero, Konga Demokratia Respubliko, Senegalo kaj Togolando, dum Benino estis partnero nur de 2012 ĝis 2017 (informo laŭ IFEF 2024).

Do estas evidente, ke la du grandaj subtenantoj de la uzo de eŭropaj lingvoj ŝanĝis siajn sintenojn, kaj tio laŭgrade devos ŝanĝi la situacion en Afriko mem. Alivorte la eksaj koloniantoj pli rapide ol la afrikaj ministroj pri edukado, kvankam kun 70-jara malfruo, akceptis la rekomendojn de Unesko kaj de ĉiuj lingvistoj, kiuj okupiĝis pri la temo.

Nur malmultajn vortojn ni diru pri la situacio en orientaafrikaj landoj, kie la lingvo efektive parolata de ĉiuj en ĉiuj niveloj estas la suahila, kiel povis konstati la partoprenintoj en la Universala Kongreso, sed tie la suahila, malgraŭ sia uzateco, devas ankoraŭ kontraŭbatali la emojn al la angla. Fakte en la pasinta jarcento sub la prezidado de Julius Nyerere la suahila ricevis grandan impulson. Ni reprenas citaĵon el libro pri la evoluo de la suahila:

La dua politika periodo komenciĝas en 1967, sekve de la fama Aruŝa-deklaro kaj de la broŝuro de Prezidanto Njerere “Eduko al Memfido” [...] Ĝi [la suahila] do anstataŭas definitive la anglan kiel instrulingvon en la unuagradaj lernejoj. La angla restas kiel fremda lingvo [...] [sed post la foriro de Njerere] [...] la registaro petis la Britan Konsilantaron analizi la problemon kaj proponi solvon. [...] Do en la jaro 1983-a la esploro farita de la Brita Konsilantaro konstatis la samajn problemojn rimarkitajn de la tanzanaj esploristoj, sed konkludis ke la angla lingvo devas pluesti la instrulingvo. (Vessella 2024)

Kaj la situacio ankoraŭ restas la sama, kun la suahila uzata de ĉiuj, ĉie, kaj la angla uzata en la supera kaj universitata instruado.

Tia, mallonge priskribita, estas la nuna situacio en Afriko en 2024, en kiu Esperanto estas instruata per la franca, la angla kaj la suahila. Kursoj en portugallingvaj landoj apenaŭ ekzistas.

### 3 Esperanto kaj la suahila

Kiel mi skribis pli frue, la atento de esperantistoj pri la suahila lingvo komenciĝis en la komenco de la 1980-a jaroj per la apero de la lernolibro de Nino Vessella (1982): *Jifunze lugha ya Kiesperanto* kaj ĝi daŭris seninterrompe

ĝis la ĉi-jara Universala Kongreso en Tanzanio. Tra la jaroj aperis ankaŭ romano tradukita el la suahila (Topan kaj Husein 1984), eĉ speco de Parnasa Gvidlibro pri la suahilaj poemo-formoj (Vessella 1980), kaj kelkaj komparoj inter Esperanto kaj la suahila, pri kiuj oni povas legi en Vikipedio (Svahila lingvo 2025). Sed pro la daŭra disvastiĝo de Esperanto en suahil-lingvaj regionoj de Orienta Afriko, ILEI mem sentis la bezonon reeldoni la lernolibron de Vessella en 2021, kiel kvaran eldonon nove prilaboritan. Fine dum la jaro de la Universala Kongreso la intereso de esperantistoj pri la suahila vere eksplodis per pluraj kursoj por lerni ĝin per Esperanto.

Kaj malgraŭ la kompleta malsameco de la vorttrezoro oni povus ŝerce sin demandi: *Je Zamenhof alisema kiswahili? 'Ĉu Zamenhof parolis la suahilan?'* La respondo evidente estas: Nepre ne! Unuflanke ne estas informoj pri tio en la kelkaj studoj pri la vivo de Zamenhof, kaj duaflanke germanoj ekokupis Orientan Afrikon en 1885 kaj kvankam ili interesiĝis pri la suahila, starigis lernejojn [*shule* (lernejo) en la suahila estas klara atesto pri tio], ili bezonis iom da tempo por verki lernolibrojn en la germana, kiujn Zamenhof estus povinta akiri.

Sed pro hazarda koincido estas multaj similecoj inter Esperanto kaj la suahila. Unue la son-sistemo estas surprize simila. La vokaloj estas: /a, e, i, o, u/ precize kiel en Esperanto, sen distingo pri vasteco/malvasteco, longeco/mallongeco. Ili estas tiom similaj al Esperanto, ke lernolibro penas klarigi al franclingvaj kongolandanoj forgesi pri la franca elparolo de vokalo plus n: “an, on, en, in hutamkwa [‘oni prononcu:’] a-nn, o-nn, e-nn, i-nn” (Muhire 2024). Konsonantoj sen problemoj estas: b, d, f, g, h, k, l, m, n, p, r, s, t, v, z, kaj pri la ceteraj ĉefe oni devas instrui kiel literumi ilin: C kiel ts; Ĉ kiel ch; Ĝ kiel j; Ĥ kiel kh; J kiel y; Ŝ kiel sh; Ŭ kiel w. La sola problema sono restas Ĵ kiel ʒ aŭ j en la franca. Kaj la akcento estas precize kiel en la pola kaj en Esperanto sur la antaŭlasta vokalo. Sekve de tio suahil-lingvanoj lernantaj Esperanton elparolas ĝin pli bone post du semajnoj ol francoj post du monatoj kaj angloj post du jaroj. Kaj tio ĝenerale validas por ĉiuj bantu-lingvanoj.

Sed la profundaj similecoj estas troveblaj en la morfologio kaj iugrade en la sintakso. La morfologio de la suahila – kaj de ĉiuj aliaj bantuaj lingvoj – sekvas ĉi tiun modelon: radiko, kiu donas la ĝeneralan ideon, kiu per prefiksoj kaj enfiksoj (antaŭmorfemoj kaj enmorfemoj) ricevas sian faktan signifon en la frazo. Jen ekzemplo:

infanO	Mtoto
infanOJ	WAtoto
infanECO	Utoto
InfanE	Kitoto

Esperanto uzas finaĵojn kaj la suahila komencaĵojn, sed la principo estas la sama, kiun abunde uzas instruistoj de Esperanto en suahillingvaj regionoj. Ni donu ankoraŭ ekzemplojn pri la verboj:

mi vojaĝas =  
nasafiri = *ni*-NA-safiri = *mi*-AS-vojaĝ

mi vojaĝis =  
nilisafiri = *ni*-LI-safiri = *mi*-IS-vojaĝ

mi vojaĝos =  
nitasafiri = *ni*-TA-safiri = *mi*-OS-vojaĝ

vojaĝi =  
kusafiri = KU-safiri = I-vojaĝ

Kaj la sistemo funkcias same regule por ĉiuj tempoj kaj ĉiuj verboj. Ni citu ankoraŭ kelkajn ekzemplojn:

mi manĝus =  
ningekula = *ni*-NGE-kula = *mi*-US-manĝ

mi estus leginta =  
ningalisoma = *ni*NGALI-soma = *mi* US-INT-leg

kaj iom da infinitivoj:

*kusema, kusoma, kula, kwenda, kufika, kupika*  
*diri, legi, manĝi, iri, alveni, kuir*

Kompreneble ekzistas aliaj kampoj de la du lingvoj, en kiuj ili komplete malsamas, ekzemple la vortaro. La suahila vortaro konsistas, krom el bantuaj vortoj, 15-elcente el arabdevenaj vortoj, proksimume 5-elcente el angla-devenaj vortoj, proksimume 4-elcente al persdevenaj vortoj kaj iom malpli el hinddevenaj vortoj kaj fine malmultaj vortoj portugal-devenaj kaj eĉ malagas-devenaj.


Ankoraŭ pli malsama rilate al Esperanto estas la enklasigado de la mondo. Dum Zamenhof sekvis la eŭropajn lingvojn kaj sisteme distingis la vortojn inter substantivoj (*o*-vortoj), adjektivoj (*a*-vortoj), verboj (*i*-vortoj), kaj adverboj (*e*-vortoj), bantuaj lingvoj dividas la mondon kaj la vortojn laŭ malsama sistemo, laŭ semantikaj aŭ signifaj klasoj: homoj, arboj, fruktoj,

bestoj, abstraktaj vortoj – inkluzive de landoj (abstrakta ideo el la nomo de loĝantoj), lokoj (kp. Knappert 1996; Muhire 2024). Kompreneble pro la amaso da pruntoj kaj la uzo de la suahila fare ankaŭ de nebantuoj, la pura klas-sistemo akiris multajn esceptojn, pro kio la signifo-klaso de multaj vortoj estas aparte lerninda.

Ĉiuokaze la simileco de la funkciado de Esperanto kaj de la suahila estas evidenta kaj faciligas la akiron de la internacia lingvo fare de tanzanianoj kaj iom pli malfacile ĉefe pro la vortara malsimileco la akiron de la suahila fare de esperantistoj, kiel montris kaj la retaj kursoj en 2024 kaj la ĉeestaj kursoj en Aruŝo dum la Universala Kongreso.

Sed la rilatoj inter esperantistoj kaj la suahila ŝajne estas la tuto de la rilatoj inter esperantistoj kaj afrikaj lingvoj. Pro la historio de la disvastiĝo de Esperanto en Okcidenta Afriko, la afrikaj lingvoj de tiu parto de Afriko ne aparte interesis la esperantistojn, inkluzive de la afrikaj parolantoj de tiuj lingvoj, kiuj estis ĉiuj loĝantaj en landoj, en kiuj la lernejoj lingvoj estis eŭropaj lingvoj.

La venontaj sekcioj de ĉi tiu artikolo traktos tiujn lingvojn.



Bildo 1:  
La vortaro de Baldi (2024)

## 4 Esperanto kaj la lingvoj de Okcidenta Afriko

La komenca instigo por la prelego en la Esperantologia Konferenco en Aruŝo, el kiu fontas ĉi tiu artikolo, estis kiel kutime laŭokaza. Emerita profesoro de la universitato en Napolo, Sergio Baldi (2025), kiu instruis tie la haŭsan kaj sudanajn lingvojn, esperantisto dum sia juneco, volis eldoni en Esperanto version malpligrandigitan de sia vortaro haŭsa-itala kaj itala-haŭsa (Baldi 2015), kaj do mi devis plonĝi en la haŭsan por revizii la parton en Esperanto. Kaj fine ankaŭ danke al la helpo de haŭsa-parolantoj la vortaro aperis (Baldi 2024, vd. bildon 1).

Sed por mi kaj por la rilatoj inter Esperanto kaj la haŭsa kaj la najbaraj lingvoj la sperto estis unika kaj estis nur la komenco de pli longa pripensado.

## 4.1 La haŭsa

La lingvo haŭsa estas lingvo apartenanta al la lingvogrupo ĥamida-ŝemida<sup>4</sup> kaj aparte al la okcidenta branĉo de la ĉadaj lingvoj,<sup>5</sup> alivorte ĝi estas parenca lingvo de la pli konata berbera lingvo aŭ malproksime parenca al la antikva egipta lingvo. Ĝi estas parolata de la haŭsoj en la norda parto de Niĝerio, Ganao, Kameruno, Benino kaj Togolando kaj en la sudaj partoj de Niĝero kaj Ĉado, kun signifaj malplimulto en Eburna Bordo kaj malgranda malplimulto en Sudano. La lingvo havas la plej interesajn trajtojn por lingvisto sed ne por lingvolernanto. Malgraŭ tio, ke ĝi originas de sen-tona lingvo, ĝi utiligas ton-altecon kaj aliajn rimedojn pri kiuj ni parolos tuj poste. Laŭ *Ethnologue* oni taksas je 54 milionoj la denaskajn parolantojn kaj je 34 milionoj la parolantojn de ĝi kiel dua lingvo, kio portas la tutan nombron de parolantoj de la haŭsa al pli ol 80 milionoj (Hausa 2025).

Mi ne scias kiel longe mi rajtas profiti el via pacienco, sed en la haŭsa:

- la vortoj estas inaj kaj viraj pro la deveno el aziaj-afrikaj lingvoj [komparu kun la araba];
- la vokaloj estas mallongaj kaj longaj;
- la vortoj havas tonojn kiel la ĉina kaj aliaj okcidentafrikaj lingvoj;
- la frazoj havas ton-ĉenojn de kiuj dependas la signifo;
- laŭ konata lernolibro oni ne lernu la sistemon de pluralo, sed ĉiujn pluralojn unuope;
- la verboj havas tempojn kaj aspektojn;<sup>6</sup>
- la pronomoj havas la distingon viran/inan ankaŭ en la dua persono, kiel en la araba, sed krome ili havas la taskon kunligiĝi kun morfemoj, kiuj indikas la aspektojn de la verbo, kiu en si mem ne estas konjugaciata.<sup>7</sup>

Estas klare, ke redoni la haŭsan en Esperanto ne estas io simpla, sed en la realo la disvastigo de Esperanto en Niĝerio, en kiu ekzistas eĉ landa asocio de esperantistoj, okazis ĉefe per la angla sen konsidero pri la haŭsa aŭ pri la aliaj lingvoj de Niĝerio aŭ de Okcidenta Afriko.

4 Konata ankaŭ per la nomo ‘afrika-azia lingvo-grupo’ kaj ankaŭ per aliaj variaĵoj.

5 Komparu Almansa-Villatoro kaj Štubňová Nigrelli (2023).

6 Vidu kion diras lernolibro: “The intricacy of the Hausa verb system is one of the more fascinating aspects of Hausa grammar.” (Kraft kaj Kirk-Greene 1973; ‘La implikaĵoj de la haŭsa verba sistemo estas unu la plej fascinaj aspektoj de la haŭsa gramatiko.’)

7 Ĉiuj ĉi tiuj elementoj de la haŭsa estas troveblaj en la libro Kraft kaj Kirk-Greene (1973).

## 4.2 La aliaj lingvoj de Okcidenta Afriko

Pro la malkovro de tiom interesaj lingvaj fenomenoj en la haŭsa mi ekinteresiĝis pri la aliaj lingvoj parolataj en Niĝerio, ĉar la plejmulto da niĝeriaj esperantistoj loĝas en tiuj regionoj, kie oni parolas la joruban aŭ la igban. Kaj denove mi malkovris lingvajn fenomenojn tre malproksimajn de Esperanto.

### *La joruba*

Ne estas tute samaj problemoj kiel en la haŭsa, ĉar ĝi apartenas al la familio nomata niĝera-konga kaj do, ĝi havas tonojn, estas izola lingvo, havas unusilabajn verbojn kun aspektoj, ne konjugaciatajn per finaĵoj sed per antaŭmetitaj morfemoj, nombradan sistemon je bazo 20, dividon de la substantivoj inter homoj kaj nehomoj, ktp. Ĉu nia Esperanto kun sia banala nombradsistemo bazita je 10, sen tonoj, aglutina kaj ne izola, ne povas aspekti facile lernebla de la 50 milionoj da parolantoj de la joruba (Yoruba 2025)? Aldone al tio la vorto-trezoro, lastatempe tre influata de la angla kaj de kristanismo estis en la pasinteco influata de islamo kaj de la araba, tiel ke *sanma* = paradizo aŭ ĉielo el la araba *السماء*; *alubarika* = beno el *البركة*; *alumaani* = riĉeco el riĉeco, mono, rimedoj el *المال*; kaj la tagoj de la semajno kiel *Atalata* (الثلاثاء) por mardo, *Alaruba* (الأربعاء) por merkredo, *Alamisi* (الخميس) por ĵaŭdo, kaj *Jimoh* (الجمعة), *Jumu'ah* por vendredo.<sup>8</sup> Ĉi tio aldonas alian tavolojon de malsamecoj inter Esperanto kaj afrikaj lingvoj, kiuj estis ĉiuj influataj de arabaj pruntvortoj alvenintaj kun islamo (Baldi 2008).

### *La igba*

Pri klasigado de afrikaj lingvoj estas daŭraj debatoj inter lingvistoj, kaj la aparteno de la igba al la grupo niĝera-kongo estas de kelkaj el ili pridubata, dum oni preferas enklasigi ĝin en la grupon atlantan-kongan. Ĝi estas ne tute simila al la joruba, ĉar ĝi havas bone distingeblajn vortokategoriojn: nomoj, pronomoj, numeraloj, verboj, adjektivoj, konjunkcioj kaj nur unu prepozicio tre elasta, kiu alprenas plurajn prepoziciajn signifojn. Sed se la prepozicio estas nur unu, ankoraŭ pli surprizaj estas la adjektivoj, kiuj estas en fermita klaso de 8 adjektivoj: *ukwu* (granda), *nta* (malgranda), *oji* (malluma), *oĉa* (luma), *oĥuru* (nova), *oĉie* (malnova), *oma* (bona), *njo* (malbona) dum la aliaj adjektivoj estas farataj per stato-verboj aŭ abstraktaj kvalito-vortoj (Emenanjo 1978).

Verboj, aliflanke, ŝajnas esti la bazaj vorto-formoj, el kiuj oni derivas aliajn vortojn, sed inverse ĝenerale oni ne faras.

Pronomoj ne distingas inter viraj, virinaj aŭ aĵaj subjektoj. *o* *maka can* signifas laŭ la kunteksto 'li, ŝi aŭ ĝi estas bela'.

8 Pri *Jumu'ah* vidu *Wikipedia*: Friday prayer (2025).

Konklude la igba estas izola lingvo kun tre malmulta vortfleksio sed kun sistemo de sufiksoj regataj de la signifoj kaj de ne fiksita vort-ordo en la frazo. Aliflanke la sufiksoj origine derivitaj de aliaj vortoj nun ne plu rajtas esti uzataj sendepende. Fine laŭ la kutimaj statistikoj de *Ethnologue* la parolantoj de la igba estas pli ol 30 milionoj (Igbo 2025).

Ĉiuokaze la igba kaj Esperanto havas rekte malsamajn funkci-manierojn.

### *La volofa*

Se ni turniĝas al lingvoj parolataj en aliaj najbaraj landoj, kie ĉeestas relative multaj esperantistoj, ni unue renkontas la volofan, alian lingvon de la sama grupo niĝera-konga. Ĝi estas ĉefe parolata en Senegalo, Gambio kaj Maŭritanio kun malplimulto en aliaj landoj (Wolof language 2025). Ĝia ĉefa dialekto, tiu de la ĉefurbo Dakaro, estas forte influita de la franca kaj de la araba. Malsame ol aliaj niĝeraj-kongaj lingvoj ĝi ne estas tona lingvo.

Sed la sola kontaktpunkto kun Esperanto ŝajnas esti la vorto *banano* veninta al Esperanto el eŭropaj lingvoj, kiuj ricevis ĝin el la volofa (Etymonline: *Banana* 2025). Ĉio cetera ne kongruas kun la fenomenoj de Esperanto. Ekzemple, por nia artikolo *la* ekzistas dek difinaj artikoloj postmetitaj kaj malsamaj laŭ la speco de vortoj: pruntovortoj el la franca aŭ aliaj lingvoj uzas *bi*: *butik-bi* (la vendejo), *xarit-bi* (la amiko), dum certaj substantivoj, i.a. islamaj religiaj, uzas *-ji*: *Jumma-Ji* (la moskeo), *jigéen-ji* (la knabino), sed la pluralo uzas *-yi*: *jigéen-yi* (la knabinoj), *butik-yi* (la vendejoj).

Ni jam diris ke la volofa ne havas tonojn, sed ĝi kompensas tion per longaj kaj mallongaj vokaloj kaj konsonantoj kaj per vokala harmonio. Krome la verba konjugacio bazita sur la pronomoj estas simila al tiu de la haŭsa. Por doni ideon pri la sistemo, ni imitu ĝin per esperantaj morfemoj. Tiel *ni ne irus* iĝus en la volofa *nineus ir*, kaj *vi manĝas* estus *vas manĝ*.

Lasta apartaĵo: la nombrad-sistemo havas du bazojn, 5 kaj 10, pro kio 16 iĝas *dek kaj kvin kaj unu*.

### *La fonua (fɔngbè)*

Alia lingvo en la sama parto de Afriko, kie tradicie estis multaj esperantistoj, estas la fonua, stabiliĝinta nomo en Esperanto por la propra nomo (fɔngbè), kutime simpligata je *Fon* en eŭropaj lingvoj. Ĝi apartenas al la grupo Gbe en la pli larĝa grupo de la atlanta-konga familio. Ĝi estas unuavice parolata en Benino, sed ankaŭ en Niĝerio kaj Togolando de ĉirkaŭ 3 milionoj da parolantoj (Fon 2025). Kiel la aliaj lingvoj Gbe, la fonua estas izola lingvo kun baza vort-ordo SVO, subjekto, verbo, objekto.

Ĝiaj apartaĵoj estas similaj al tiuj de aliaj lingvoj de tiu grupo jam viditaj, kvankam nazaj vokaloj prenas la lokon de longaj vokaloj. Krome la bazaj tonoj estas du: alta, malalta, sed en la vortoj ili kombiniĝas tiel ke oni povas

trovi sinsekvojn alta/alta, alta/malalta, ktp. kaj kiel en la haŭsa la sinsekvo de tonoj en la frazoj havas signifon.

## 5 Konkludo aŭ prefere pravigo pri ĉi tiu artikolo

Oni nun rajtas sin demandi, kiu estas la celo de ĉi tiu listigo de okcidentafrikaj lingvoj kaj de ties apartaj trajtoj. Tiu listigo volas reliefigi la absolutan malsamecon inter tiuj lingvoj kaj Esperanto. Estas historia fakto, ke la esperantigo de okcidentafrikaj landoj okazis per la koloniaj lingvoj, kiuj estis tiam kaj ankoraŭ nun la lingvoj instruataj en la lernejo kaj do konataj de kleraj afrikanoj, kiuj povus interesiĝi pri Esperanto. Tio estis periodo, kiam afrikaj infanoj estis devigataj citi el francaj lernolibroj frazojn senrilatajn al iliaj vivoj, kiel “Niaj antaŭuloj, la gaŭloj”, kaj nenio alia estis ebla (Binet 1967). Sed nun 70 jarojn post la rekomendo de Unesko ankaŭ tiuj afrikaj lingvoj trovas ĉiam pli da spaco en lernejoj kaj baldaŭ ni estos devigataj uzi ilin por instrui Esperanton. Kaj por vere komprenigi la sistemon de Esperanto, oni devos klarigi kiel malmunti la sistemon de la lokaj lingvoj kaj transiri al la sistemo de Esperanto, pli simpla sed malsama, kaj tion devos unuvice kompreni la lokaj instruistoj. Por povi fari tion oni bezonas la komparan laboron faritan por la suahila kaj tio estas tasko de esperantistaj lingvistoj kunlabore kun lokaj esperantistoj parolantaj tiujn lingvojn.

Alia instigo verki ĉi tiun artikolo fakte venis de mia partopreno pri la redaktado de verko ankoraŭ eldonota por klarigi la lingvon fonuan al esperantistoj (Gbadamassi, aperos). La verkinto estas esperantisto el Benino, parolanto de la fonua, kaj instruisto en beninaj lernejoj, plena konanto de la franca kaj de ĝia gramatiko. Nun, en tiu pionira laboro estis klare, ke la tuta gramatika armilaro de la franca, simila al tiu de Esperanto, estas komplete neutila por klarigi la fonuan. Sama ĵonglado necesos por komprenigi al parolanto de unu el tiuj lingvoj, kiel funkcias Esperanto.

## Bibliografio

- Almansa-Villatoro, M. Victoria kaj Silvia Štubňová Nigrelli. 2023. “Comparative Afroasiatic Linguistics and the Place of Ancient Egyptian within the Phylum.” *En Ancient Egyptian and Afroasiatic: Rethinking the Origins*, redaktis M. Victoria Almansa-Villatoro kaj Silvia Štubňová Nigrelli. University Park: Eisenbrauns / Penn State University.
- Baldi, Sergio. 2008. *Dictionnaire des emprunts arabes dans les langues de l’Afrique de l’Ouest et en swahili*. Paris: Éditions Karthala.
- Baldi, Sergio. 2015. *Dizionario hausa: Hausa-italiano, italiano-hausa*. Milano: Hoepli.

- Baldi, Sergio. 2024. *Vortaro haŭsa-esperanto kaj esperanto-haŭsa*. New York: Mondial.
- “Baldi, Sergio.” 2025. *Orcid*. <https://orcid.org/0000-0003-4099-1497> (15.04.2025)
- “Banana.” 2025. *Etymonline*. <https://www.etymonline.com/word/banana> (15.04.2025)
- Binet, Jacques. 1967. “L’Histoire africaine et nos ancêtres les gaulois.” *Outre-Mers. Revue d’histoire* 54, kajeroj 194–197: 209–218. [https://www.persee.fr/docAsPDF/outre\\_0300-9513\\_1967\\_num\\_54\\_194\\_1449.pdf](https://www.persee.fr/docAsPDF/outre_0300-9513_1967_num_54_194_1449.pdf) (15.04.2025)
- Emenanjo, Nolue. 1978. *Elements of Modern Igbo Grammar – a descriptive approach*. Ibadan: Oxford University Press.
- “Fon.” 2025. *Ethnologue*. <https://www.ethnologue.com/language/fon/> (17.04.2025)
- “Friday prayer.” 2025. *Wikipedia*. [https://en.wikipedia.org/wiki/Friday\\_prayer](https://en.wikipedia.org/wiki/Friday_prayer) (17.04.2025)
- Gbadamassi, Latifu. Aperos. *La fongbea en 12 lecionoj por esperanto-parolantoj*.
- Goes, Heidi. 2007. *Afero de espero – Konciza historio de la Esperanto-movado en Afriko*. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio.
- “Hausa.” 2025. *Ethnologue*. <https://www.ethnologue.com/language/hau/> (15.04.2025)
- [IFEF] Institut de la Francophonie pour l’éducation et la formation. 2024. Enseignement bi-plurilingue. <https://ifef.francophonie.org/elan/> (03.04.2025)
- “Igbo.” 2025. *Ethnologue*. <https://www.ethnologue.com/language/ibo/> (15.04.2025)
- Knappert, Jan. 1996. *Vortaro Esperanto-Suahila / Kamusi Kiesperanto Kiswahili*. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio.
- Kraft, Charles kaj A. H. M. Kirk-Greene. 1973. *Teach Yourself Hausa*. London: Hodder and Stoughton.
- Muhire, Joel. 2024. *Kiesperanto Kwetu – Kitabu cha kujifunza Kiesperanto*. Arusha: Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI).
- [OIF] Organisation internationale de la Francophonie. 2025. <https://www.francophonie.org>
- Sekelj, Tibor. 1962a. *The International Language Esperanto. Common Language for Africa. Common Language for the World*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Sekelj, Tibor. 1962b. *La langue internationale Espéranto. La langue commune pour l’Afrique. La langue commune pour le monde entier*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Sekelj, Tibor. 1962c. *Al-lugha al-dualiyya al-isbirantiyya. Lugha al-’alam adjma’*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.

- “Svahila lingvo.” *Vikipedio*. [https://eo.wikipedia.org/wiki/Svahila\\_lingvo](https://eo.wikipedia.org/wiki/Svahila_lingvo) (17.04.2025)
- Topan, Farok kaj Ebrahim Husein. 1984. *Salale!* Pisa: edistudio.
- [UEA / TEJO] [Universala Esperanto-Asocio / Tutmonda Esperantista Junulara Organizo]. 1979. *Kwa kulinda tamaduni za afrika*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- UNESCO. 1953. *The Use of Vernacular Languages in Education*. Paris: UNESCO. [https://www.tolerancia.org/upimages/Manifiestos/unesco\\_1953\\_english.pdf](https://www.tolerancia.org/upimages/Manifiestos/unesco_1953_english.pdf) (01.10.2025)
- Vessella, Nino. 1980. *Skizo de sūahila metriko*. Bellinzona: Hans Dubois.
- Vessella, Nino. 1982. *Jifunze lugha ya Kiesperanto*. Latina: la aŭtoro.
- Vessella, Nino. 2024. *Sūahilaj studoj*. Baraka: Université Espoir du Congo, Faculté des Langues.
- “Wolof language.” 2025. *Britannica*. <https://www.britannica.com/topic/Wolof-language> (15.04.2025)
- [World Bank]. 2021. *Loud and Clear: Effective Language of Instruction Policies for Learning*. International Bank for Reconstruction and Development / The World Bank. <https://documents1.worldbank.org/curated/en/517851626203470278/pdf/Loud-and-Clear-Effective-Language-of-Instruction-Policies-For-Learning.pdf> (03.04.2025)
- “Yoruba.” 2025. *Ethnologue*. <https://www.ethnologue.com/language/yor/> (15.04.2025)

## Pri la aŭtoro

Renato Corsetti estis veterana esperantisto, kiu interesiĝis pri multaj aspektoj de la movado por la internacia lingvo Esperanto, interalie pri disvastiĝo de Esperanto en Afriko. Lia lasta profesia posteno estis profesoro pri psiĥolingvistiko en la Universitato de Romo “La Sapienza”.

## About the author

Renato Corsetti was a veteran Esperantist who was interested in many aspects of the movement for the international language Esperanto, including the development of Esperanto in Africa. His last professional position was professor of psycholinguistics at the University of Rome “La Sapienza”.

## Sull'autore

Renato Corsetti è stato un veterano esperantista interessato a molti aspetti del movimento per la lingua internazionale esperanto, tra cui la diffusione

dell'esperanto in Africa. È stato professore di psicolinguistica all'Università di Roma "La Sapienza".

### **Esperantists face to face with the African Languages**

**Summary:** Esperanto is spreading very fast now in Africa and enthusiasm for it currently exceeds that of other continents. In the meantime, the linguistic situation in Africa is beginning to change in favour of using local languages in West Africa. There are a few main reasons for this, which can be summarised by a change in the policy of the World Bank, which for decades only gave loans to developing countries on condition that they teach major international languages. For this reason African languages are now being used more and more in education, and therefore the movement needs the same comparative studies that have already been done in the past decades on Swahili, if we really want to produce effective teaching material about Esperanto in African languages.

**Keywords:** Esperanto, Hausa, Niger-Congo languages, Swahili

### **Esperantisti avanti le lingue africane**

**Riassunto:** L'esperanto si sta diffondendo molto velocemente in Africa e l'entusiasmo per esso supera quello degli altri continenti. Nel frattempo la situazione linguistica in Africa comincia a cambiare a favore dell'utilizzo delle lingue locali anche nell'Africa occidentale. Ci sono alcune ragioni principali che possono essere riassunte in un cambiamento nella politica della Banca Mondiale, che per decenni ha concesso prestiti ai paesi in via di sviluppo solo a condizione che insegnassero le principali lingue internazionali. Da ciò ne consegue che le lingue africane vengono utilizzate sempre di più nell'istruzione e quindi il nostro movimento ha bisogno degli stessi studi comparativi che sono già stati fatti negli ultimi decenni sullo swahili, se vogliamo davvero produrre materiale didattico efficace sull'esperanto in lingue africane.

**Parole chiave:** Esperanto, Hausa, lingue Niger-Congo, Swahili